


La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

sabaton, la 5-an de Julio, 2014 • numero ses

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ 9 atm –
12:30 ptm:
Kursoj
(same kiel
ĉiutage!)



- ★ 3:00 – 4:00 ptm
Student Union, Upper
Lounge

Teo-ceremonio estas parto de tradicia japana kulturo. Hideko regalos du homojn per verda teo kaj dolĉaĵo, kiujn ŝi portis el Japanujo. Bonvolu veni kaj spekti!

- ★ 4:00 – 5:00 ptm
Student Union, Upper
Lounge

Lottie prezentos indiĝenajn ludojn el norda Kanado.

- ★ 7:00 ptm – 8:00 ptm
Student Union, Upper
Lounge

Abengo instruos al ni ĉinan kaligrafion: eksciu kiel skribi ŝatatan proverbon, vian nomon, ktp. en la ĉina!

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstiron, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redakto en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Unu sola lingvo? Ne, tamen dankon!


de Eriko PEDERSEN

[István petis ke liaj lernantoj verku mallongan eseon pri la temo: “Ĉu estus bona afero, se la homaro havus unu solan lingvon?” Jen la respondo de Eriko. –Red.]

La mondo bezonas lingvon komunan, sed ni devas ankaŭ konservi la aliajn lingvojn de la mondo.

Lingvo koloras la manieron, per kiu oni pensas, kaj la ekzisto de multnombraj lingvoj ebligis al malsamaj popoloj establi malsamajn kulturojn. Kiam la unuaj nacioj aŭ unuaj popoloj – kiel la kanadaj indiĝenaj popoloj nomas sin – perdas siajn lingvojn, ili perdas siajn kulturojn kaj ankaŭ la kapablon doni ilin al siaj infanoj kaj genepoj.

Parolanto de la kŭakŭala diras, ke tiu indiĝena lingvo de Brita Kolombio estas poezia kaj verb-orientita, dum, al li, la angla ŝajnas tre peza kun substantivoj. En la kŭakŭala la vorto por “infano” tradukiĝas kiel “mia kialo por spirado”, dum proponi geedzecon tradukiĝas kiel



“ĉu vi kunhavas la saman spiron?” Parolanto de la senĉotena diras, ke en lia lingvo la Tero tradukiĝas kiel “Mia deziro”; la poseda formo temas pri la Ĉio-kreinto. Simile, “monto” estas “mia donaco”, kaj “insuloj” estas “miaj maraj parencoj”. En pluraj unua-naciaj lingvoj, la vorto por “malriĉeco” signifas “sensalmeco”. Tiaj metaforoj ne tradukiĝas oportune el fonta lingvo kaj eble ne havas egalvalorajn parolturnojn en la cetera lingvo.

En la biblia legendo de la Babelturo, unusola lingvo ebligis al la homaro malbonaĵe kunlabori. Eble la homaro devas ne aspiri unusolan lingvon ĝis ni establos fortajn instituciojn, kiuj progresigos harmonion kaj bonan konduton inter ĉiuj popoloj.

La tutmonda disvastiĝo de la angla kiel fakta mondlingvo kondukis al la dominado de multaj mondaj kulturoj fare de la homogena usona, kiu malavantaĝigas tiujn, kiuj ne parolas la anglan. Neniu serioza objekto povas esti levata al la ideo de universala dua lingvo, sed la kulture neŭtrala Esperanto estas pli bona kandidato por tiu rolo.

Ĉu *Captain Fantastic* parolos Esperante?

de Arlyn KERR

Post 29 jaroj de esperantismo mi fine havis la ŝancon profiti finance de ĝi – sed mi rifuzis la monon. Kiel tio okazis? La afero komenciĝis per retroŝta mesaĝo de film-kompanio. Ĝi nun kreas filmon en kiu troviĝas naŭ linioj en Esperanto, kaj oni petis helpon pri la prononcado.

“Ĉu vi kapablas helpi?”, oni demandis. Jes. “Ĉu vi konsentas helpi?” Jes. “Ĉu du horoj sufiĉos?” Certe. “Kiom da mono vi deziras por la du horoj?” Neniom. “Ĉu vere?!” Jes, kaj ankaŭ kun mi estos mia edzo Les; ankaŭ li pretas helpi senpage.

Do la direktoro sendis la liniojn al ni, kaj tuj ni vidis problemojn. La unua linio estis “Mi maltrafas Panjonn.” Krom la ekstra “n”, ili certe celis “Mankas al mi Panjo.” Do mi klarigis la celon de kelkaj linioj kaj korektis ilin. Poste ni iris al la loko kie la aktoroj provroladas. Ni laboris kun du ĉarmaj junulinoj pri la prononcado. Ili diligente laboris, kaj post unu horo ili eĉ povis diri la liniojn parkere. Estis tre interesa sperto por mi kaj Les.

Nun ni antaŭĝuas spekti la filmon en kinejo, verŝajne en 2015. La titolo estas *Captain Fantastic*. Se la prononcado estas fuŝa, ne kulpigu min, mi petas, ĉar dum la provrolado ĝi estis bonega.

La mondo kun unu lingvo (dua vidpunkto)

de Derek ROFF

[Kaj jen respondo de Derek al la demando de István. (Vidu ankaŭ la eseon de Eriko en paĝo 1.) –Red]

Ne estas principe avantaĝa havi plurajn lingvojn en la mondo. Se la mondo nun havus nur unu lingvon, kaj mi estus parto de la komitato por decidi, ĉu ni akceptu Dian Donacon de la Babela Turo, mi verŝajne voĉdonus kontraŭ tiu propono. Sed tio ne estas la nuna demando. Ni vivas en multlingva mondo. Niaj praavoj jam aĉetis la Babelan Turon, kun ĉiuj akcesoraĵoj, sekvoj, kaj aldonajoj. Ili ne finpagis la altan prezon, kaj ĉiuj generacioj ekde tiam ankoraŭ pagas renton kontraŭ la perdita kapitalo. Ĉu ne estus bone forigi porĉiame tiun ŝuldon?

Eble ne. Eble ni perdus pli ol ni gajnus. La lingvo estas la ĉefa portilo kaj konservilo por la kulturo. Ĉiu kulturo, kaj ĉiu lingvo, enhavas grandan kvanton da scioj kaj informoj. Kun ĉiu lingvo, kiun ni perdas, ni samtempe perdas parton, aŭ ofte la tuton de la scioj de tiu kulturo. Ni perdas sciojn pri la natura vivo en tiu ĉirkaŭaĵo. Ni perdas informojn pri la vidpunktoj, deziroj, revoj, kaj kredoj de tiuj homoj. Ni perdas la arton kaj literaturon

de tiu kulturo, en kiu kuŝas ideoj, kiujn neniu alia iam precize esprimis. Ni perdas la eblecon kompreni tiujn homojn, kaj kontroli la grandajn variojn kaj harmoniojn en homa pensado kaj sentaro. Tiel, ni perdas okazon pli bone kompreni nin mem. Laŭ mi, tio estas grandega perdo, kaj mi ne deziras rapidigi ĝin.

La avantaĝoj de unulingva mondo foje estas troigitaj. La mondo ŝparus iom da mono, sed ĉu ĝi bone kaj saĝe elspezus ĝin poste? La historio sugestas ke ne. Ĉu interkompreno estus pli granda? Rigardo en unulingvan landon sugestas ke ni tre bele kapablas havi akrajn konfliktojn kun niaj lingvaj gefratoj. Certe komercistoj ŝatus. Kaj mia sperto sugestas ke tio, kio plej plaĉas al komercistoj, plej ofte ne tre plaĉas al mi.

Sendube, mia starpunkto fontas parte el emocia reago. Mi ŝatas lingvojn. Mi ŝatas kulturojn. Plaĉas al mi diverseco. Kiom eble plej, mi deziras konservi la variajn kulturajn ecojn de la mondo, ĉar mi trovas ilin interesaj kaj belaj. Tio estas pli afero de estetiko ol saĝo. Sed ĝi estas por mi forta motivo.

Eĉ se ĉio ĉi ne konvinkus min, mi rekonas la rajton de memdecido. Preskaŭ ĉiuj lingvo-komunumoj deziras defendi sin kontraŭ la malapero. Mi subtenas tiun rajton kaj preferon. Kiel budhano diris, eĉ se via religio permesas al vi mortigi insektojn senpense, memoru ke la religio de la insektoj ne permesas tion. Ni lasu la lingvojn vivi.

Restoracia recenzo

de Steĉjo SCHWICHOW

En la ĉarma vilaĝo Cadboro mi trovis ege bonan Japanan restoracion ĉe la maldekstra flanko de 2560A Sinclair Road, ĵus antaŭ la strat-signalilo.

Mi vespermanĝis tie kaj trovis kelkajn vegetarajn elektojn. Mi elektis la “Vegetaran Miksaĵon” kaj trovis ĝin ege bongusta kaj satiga.

Aparte la stabanoj estis ĉarmaj kaj helpemaj.

Mi rekomendas la restoracion.

tradukis George PARTLOW

La principo de kompatado kuŝas ĉe la koro de ĉiuj religiaj, etikaj kaj spiritaĵoj tradicioj, alvokante nin al ĉiama traktado de ĉiuj aliaj homoj kiel ni mem deziras esti traktataj. Kompatado pelas nin labori senlace por malpezigi la suferadon de niaj kunuloj, por detronigi nin de la centro de nia mondo kaj meti alian tie, kaj honori la netuŝeblan sanktecon de ĉiu unuopa homo, traktante ĉiujn, senescepte, per absoluta justeco, egaleco, kaj respekto.

Ankaŭ necesas en kaj publika kaj privata vivo eviti konsekvence kaj kunsentade dolorigadon. Agi aŭ paroli perforte pro malico, ŝovinismo, aŭ mem-intereso, plimalriĉigi, ekspluati aŭ rifuzi bazajn rajtojn al iu ajn homo, kaj instigi malamon por kalumnii aliajn – eĉ niajn malamikojn – estas neado de nia komuna homeco. Ni agnoskas, ke ni ne sukcesis vivi kompateme, kaj ke iuj eĉ pliigis la sumon de homa mizero je la nomo de religio.

Ni do alvokas ĉiujn virojn kaj virinojn por remeti kompaton en la centron de moralo kaj religio:



La Ĉarto de Kompatado

- reveni al la antikva principo ke iu ajn interpreto de sankta skribo, kiu generas perforton, malamon aŭ maldignon estas neleĝa

- certigi ke oni donas al gejunuloj precizan kaj respektoplenan informon pri aliaj tradicioj, religioj kaj kulturoj
- kuraĝigi pozitivan taksadon de kultura kaj religia diverseco
- kultivi informitan kunsentadon de la suferado de ĉiuj homoj – eĉ tiuj konsiderataj kiel malamikoj.

Ni urĝe bezonas igi la kompaton klara, hela kaj dinamika forto en nia dividita mondo. Enradikiĝinta en principa decido transcendi egoismon, kompatado povas rompi politikajn, dogmajn, ideologiajn kaj religiajn limojn. Naskita de nia profunda interdependeco, kompatado estas esenca por homaj rilatoj kaj por plenumita homeco. Ĝi estas la vojo al iluminiĝo kaj nemalhavebla al la kreo de justa ekonomio kaj paca tutmonda komunumo.

La originalon ĉarton oni povas trovi ĉe <<http://charterforcompassion.org>>.